LA ANĜEVA FOLIO N° 17
**SEPTEMBRE 2010**

# LA ANĜEVA FOLIO
LA FEUILLE ANGEVINE

Centre Culturel Angevin d'Espéranto
www.esperanto-angers.fr

Les dates à retenir :

**CONFÉRENCES DE MIREILLE GROSJEAN**

**mercredi 15 septembre**
20h30 - Salle Les Jonchères à Angers
**Le Japon de tous les jours** (en espéranto)

**jeudi 16 septembre**
20h30 - Salle Desjardins à Angers
**Education à la paix** (en français)

## Quelques mots

En espérant que vous avez passé de bonnes vacances, le groupe d'Angers vous fait part de ses activités pour la rentrée.

Septembre, mois de la paix, est l'occasion pour le groupe de vous inviter à une conférence en espéranto le mercredi 15 septembre, à une autre, en français le jeudi 16 et à la Journée de la Paix le 21 septembre. (Voir le détail dans la revue). Nous vous y accueillerons avec plaisir.

Pierre Jagueneau, Président

## Kelkaj vortoj

Esperante, ke bonajn somerferiojn vi ĝuis, la Anĝeva grupo prezentas al vi siajn aktivaĵojn por la rekomenco de la lernojaro.

Septembro, pacomonato, estas okazo por la grupo inviti vin al prelego, Esperante, merkredon la 15-an de septembro, kaj al alia, franclingve, jaŭdon la 16-an kaj al la Pacotago la 21-an de septembro. (Vidu detalojn en la gazeto).

Ni plezure bonvenigos vin tie.

Pierre Jagueneau, Prezidanto

## Trésors de notre bibliothèque

### L'AVÈNEMENT DE HITLER
**Toile de fond du nouveau roman de TREVOR STEELE**

Parmi les écrivains qui ont doté - en seulement 123 ans – la langue internationale d'une littérature déjà considérable, figure le Néo-Zélandais Trevor Steele. Son dernier roman paru a pour titre : «KVAZAŬ ĈIO DEPENDUS DE MI» (Comme si tout dépendait de moi).

Le livre, inspiré par la vie d'un personnage réel, décrit la lutte désespérée d'un groupe de journalistes démocrates allemands face à la montée au pouvoir de Hitler. Derrière le récit de la vie personnelle et sentimentale d'un directeur de presse, l'auteur décrit l'agonie de la république de Weimar, en bute à la violente hostilité des nationalistes et des nazis.

On doit constater la parfaite connaissance de l'auteur concernant les épisodes de l'histoire allemande, entre la fin de la première guerre mondiale et l'avènement de Hitler en 1933.

Le roman peut donc, au premier chef, intéresser ceux que l'histoire ne laisse pas indifférents.

Trevor Steele nous fait partager l'angoisse de courageux rédacteurs d'une revue, témoins de l'impuissance des partis traditionnels alors que la rue est déjà livrée aux exactions des hordes de chemises brunes qui détruisent, incendient, et qui arrêtent ou tuent leurs opposants.

Le Kurt Lenz du roman refuse de quitter à temps l'Allemagne avant son arrestation et continuera son combat jusqu'à sa mort tragique, d'où le titre du livre : «COMME SI TOUT DÉPENDAIT DE MOI»

André FRANGEUL

## Trezoroj de nia biblioteko

### LA EKREGADO DE HITLER
**Fono de la nova romano de TREVOR STEELE**

Inter la verkistoj kiuj havigis - en nur 123 jaroj – al la internacia lingvo, konsiderindan literaturon, troviĝas la Nov-Zelandano Trevor Steele.




Lia lasta publikigita romano titoliĝas « KVAZAŬ ĈIO DEPENDUS DE MI » La libro, inspirita de la vivo de reala persono, rakontas la senesperan lukton de grupo de germanaj demokrataj ĵurnalistoj vidalvide al la suprenirado de Hitler. Malantaŭ la rakonto pri la persona kaj sentimentala vivo de gazetdirektoro, la aŭtoro priskribas la agonion de la Respubliko de Weimar kiu frontas la violentan malamon de la naciistoj kaj de la nazioj.

Oni devas konstati la perfektan konon de la aŭtoro pri la epizodoj de la germana historio inter la fino de la unua mondmilito kaj la alveno de Hitler en 1933.

La romano povas do, unue, interesi tiujn, kiuj interesiĝas pri Historio.

Trevor Steele partoprenigas nin la tagan angoron de kuraĝaj redaktoroj de revuo, atestantoj de la senpotenteco de la tradiciaj politikaj partioj kiam la stratoj estas jam liverataj al la ekscesoj de la brunĉemizaj bandaĉoj kiuj detruas, incendias, kaj kiuj arestas kaj murdas siajn oponantojn.

La Kurt Lenz de la romano rifuzas forlasi ĝustatempe Germanion kaj ĝis sia aresto kaj tragika morto daŭrigas sian lukton : « KVAZAŬ ĈIO DEPENDUS DE MI » - titolo de la romano.

André FRANGEUL



## GIJOM ARMIDE : UN CHANTEUR ESPÉRANTISTE ENGAGÉ

Gijom a bien voulu nous raconter son parcours et nous confier ses projets.

Voici quelques extraits :

« J'habite Paris ! Montmartre, plus exactement. Pour ce qui est de ma formation musicale, j'ai simplement fait quelques années de conservatoire quand j'étais petit (de 8 à 12 ans). Puis, pas du tout emballé par le rapport travail/plaisir de cet apprentissage, j'ai tout laissé tomber pour m'y remettre en autodidacte un an plus tard, sans jamais plus m'arrêter ; ce qui fait que j'ai trouvé mon style avant de trouver la technique.

Pour ce qui est de mon engagement pour l'amélioration de la condition humaine, il s'est concrétisé par une formation d'éco-conseiller, titre délivré en un an par l'Institut Eco-conseil, installé à Strasbourg. Cela fait bientôt trois ans que je travaille dans une association engagée pour un développement durable dans et pour le département de l'Essonne.

J'ai également suivi une formation d'acteur et si je n'ai pas persévéré, c'est parce que le simple fait de devoir me vendre m'empêchait littéralement de développer ma sensibilité artistique. Il n'y a pas possibilité de rencontre.

Ce qui m'intéresse dans le contact avec le public n'est pas de m'exposer à lui mais d'avoir un véritable échange. Il suffit de «donner le LA» dès le début en posant un rapport simple et une ambiance conviviale.

Je suis d'ailleurs en train de mettre au point un spectacle, pour le public francophone cette fois, qui s'intitulera «Chansons issues de l'agriculture biologique» et qui sera ce que j'appelle une «concérence»(1) sur les enjeux de notre siècle, notamment écologiques et notamment en lien avec notre alimentation. J'y reprendrai les messages de gens comme Pierre Rabhi(2), Patrick Viveret(3), Dominique Guillet(4).

Je cherche à mettre au premier plan la dimension profondément humaine et sensible de ces messages.

Les messages dont je me fais le porte-parole dans mon spectacle sont des messages d'amour et je veux appuyer cette dimension-là. Je veux les donner à entendre sous cet angle-là à celles et ceux qui ne franchissent pas le cap et macèrent dans la résignation. »

***Découvrez une chanson de Guillaume Armide en page 6***

## GIJOM ARMIDE : ENGAĜIĜINTA ESPERANTO-KANTISTO

Gijom bonvolis rakonti al ni sian vojiron kaj konfidi siajn projektojn.

Jen kelkaj eltiraĵoj :

« Mi loĝas en Parizo ; pli precize «Montmartre». Koncerne mian muzikan instruadon, mi tutsimple lernis dum kelkaj jaroj en konservatorio, kiam mi estis infano (8-12 jaraĝa). Poste, tute ne interesita pri la laboro kaj plezuro atendita de tiu laboro, mi delasis tion por refoje, post unu jaro, lerni aŭtodidakte por poste neniam



ĉesi. Do, mi trovis mian stilon antaŭ ol malkovri la teknikon.

Mi konkretigis mian promeson por plibonigi la homan kondiĉon per trejniĝado nomata eko-konsilisto, titolo atingita post unu jaro en la instituto «Eco-conseil» situanta en Strasburgo. De preskaŭ tri jaroj mi laboras en asocio engaĝiĝinta por daŭripovo en kaj por la departemento «Essonne».

Mi ankaŭ sekvis aktoran instruadon, sed mi ne persistis ĉar mi devus komercigi tion, kio tute malebligis min por kreskigi mian artan sentemon. Renkontiĝoj ne eblas.

Tio, kio gravas inter mi kaj la publiko ne estas ekspozicii min al ĝi, sed vere interŝanĝi. Sufiĉas komence de koncerto, donaci simplan rilaton kaj gastigan etoson.

Nuntempe, mi estas adaptanta spektaklon por francparolanta publiko, kiu nomiĝos «Chansons issues de l'agriculture biologique» (Kanzonoj originantaj el ekologia agrikulturo) kiu estos laŭ mi «koncerenco»(1) pri la defioj de nia jarcento, aparte ekologiaj kaj rilatantaj kun niaj nutraĵoj. Mi ripetos la mesaĝojn de homoj kiel Pierre Rabhi(2), Patrick Viveret(3), Dominique Guillet (4). Mi intencas emfazi la profunde humanan dimension de tiuj mesaĝoj.

La mesaĝoj, por kiuj mi estas proparolanto en mia spektaklo, estas ammesaĝoj ».

***Malkovru kanton el Gijom Armide sur paĝo 6***

---

*(1) koncerenco : koncerto konferenco - aŭ similaj aferoj (noto de la redaktanto)*

*Interretaj ligiloj - liens internet :*

*(2) Pierre Rabhi : http://www.youtube.com/watch?v=a9ZvoiWO_4c*
*(2) Pierre Rabhi : http://www.youtube.com/watch?v=LivI0S7OBBg*
*(3) Patrick Viveret : http://extranet.sgdf.fr/La-sobriete-heureuse-Patrick*
*(4) Dominique Guillet : http://www.youtube.com/watch?v=ia5GqRmPKfU*

# Globusoj : nova naturscienca populara Esperanto-revuo

**Verkita kaj eldonita de Dominik Bertrand, la unua numero *Globusoj* freŝdate aperis. Tiu revuo estas spirita ido de *Homo kaj Kosmo* kaj volas esti plua paŝo al popularigo de praktika scienco.**




## Globusoj estas naturscienca

Temas ĉefe pri fiziko sed ankaŭ pri ia ajn naturscienco, kiu racie baziĝas sur la metodo «modelado-eksperimentado». Temas nek pri teknologio, nek pri pseŭdo-sciencoj. *Globusoj* ne konsentas kun la nuntempa devojigo de scienco al celoj politikaj, danĝeraj, sklavigaj, ktp.

La artikoloj konsistas el : - rakonto pri eksperimentado aŭ aplikado de naturscienco, en etoso homa, kiel eble plej reviga. - modelo (kun hipotezoj, difinoj, asertoj, resumita matematika demonstrado), en etoso pli scienca, malpli homa.

## Globusoj estas populara

Inter sciencaj revuoj, kiuj estas tro fakaj kaj ofte neatingeblaj, kaj vastpublikaj priscienca revuoj, *Globusoj* :

- celas progresadon kaj emancipadon de ĉiuj, ĉu junaj ĉu ne, ĉu kleraj ĉu ne, ĉu en ĉu ekster lernejo... Ĉiu, inter laikulo kaj instruisto pri fiziko,
- lernas leĝojn kaj modelojn pri fiziko pli-malpli klasikajn,
- spertiĝas pri la scienca metodo «modelado-eksperimentado»,
- malkovras ĉu malnovajn ĉu originalajn ĉu forgesitajn aparatojn kaj metodojn,
- instigatas al starigo de novaj eksperimentoj aŭ al praktikado de scienco amatorskale,
- tiel partoprenas disvastigon de Esperanto en ĉiujn mediojn,
- rajtas uzi kaj traduki niajn paĝojn,
- proponas al la revuo novajn artikolojn pri propraj eksperimentoj.

*Globusoj* neniam emfazos diferencojn inter partoprenantoj. Aperos nek konkursoj nek premioj.

## Globusoj estas Esperanto-revuo

La artikoloj uzas :

- internacian lingvon Esperanto,
- sistemon internacian de unuoj (S.I.),
- normigitan kompostadon pri scienco kaj matematiko,
- tradician tipografion.

## Ĉe Globusoj

- ne ekzistas landoj, regno... (sed ja regionoj, urboj...) - ne ekzistas mono, komerco, reklamoj... - ne ekzistas religioj.

**Informu vin :**

www.globusoj.org
dominik@globusoj.org

---

## Ni ludis

N° 10

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1 | ĴURNALISTO | A | ĴETONOJ - UR |
| 2 | ERAOJ - NAIV | B | URODEL - PRA |
| 3 | TOL - LSD - GO | C | RAL - VERAND |
| 4 | OD - POT - ORL | Ĉ | NO - POKER |
| 5 | NEVO - REM | D | AJLO - RJAFO |
| 6 | OLEKRANOJ | E | STRANGA |
| 7 | REJNO - OK | F | IND - ENORMA |
| 8 | PARAGRAFO | G | SA - OMO - AUT |
| 9 | URN - FAMUL | Ĝ | TIGR - JOFLE |
| 10 | RADIO - ATEN | H | OVOLO - KO |

## Ni ludas

**Horizontale :**

1) Havaja gitaro – Tono.
2) Spirilo – Li ludas rolon en teatraĵo (sf).
3) Agi tiel same, kiel alia persono – Okcidento (sf).
4) Ĝema plendo pro kordoloro – Ĝelatmiksaĵo kun lumimpresiĝema substanco (sf)..
5) Iu, kiu iras eksteren.
6) Rilata al religio – Efiki sur (sf).
7) Komenco de sonato – Inverse : nedifina pronomo – Malmulte aĝa.
8) Membro – Atentigilo – Pare, ĝi portas kaj gvidas trajnon (sf).
9) Senbride perforta.
10) Oficiale nuligi ion (sf) – Cifero – Doloro aŭ amara bedaŭro.

**Vertikale :**

A) Tia, ke ĝi koncernas ĉiujn homojn sur la tero.
B) Skvamulo kiu kapablas ŝanĝi sian koloron (sf).
C) Konsumi por sia utilo – Instrumento (sf) – Loĝejo de estonta birdo.
Ĉ) Hazardludo – Inverse : pronomo.
D) Definitiva formo de insekto.
E) Artikolo – Politika unuiĝo de regnoj (sf) – Individuo.
F) Rilataj al supernaturaj fenomenoj – Prefiksto indikanta tujan komencon.
G) Inverse : ano de kaŭkaza gento (sf) – Voĉdonilujo (sf).
Ĝ) Fari kavaĵon, eltirante teron – Ĝiaj ŝosoj estas uzataj por saŭcoj.
H) Tuto de la reguloj kaj procedoj difinitaj por fari ion (sf) – Tute similaj.

**N° 11** (sf) : sen finaĵo Ŭ = U

| | A | B | C | Ĉ | D | E | F | G | Ĝ | H |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | | | | | | | | ■ | | |
| 2 | | | | | ■ | | | | | |
| 3 | | | | | | ■ | | | | |
| 4 | | | ■ | | | | | | | ■ |
| 5 | | | | | | | | | ■ | |
| 6 | | | | | | | | ■ | | |
| 7 | | | ■ | | | ■ | | | | |
| 8 | | | | ■ | | | ■ | | | |
| 9 | | ■ | | | | | | | | |
| 10 | | | | | ■ | | | ■ | | |

## *Des congrès riches en partages et émotions :*

**65ème CONGRÈS de SAT-Amikaro à HILLION (près de Saint-Brieuc)**
**du 3 au 6 avril 2010**

organisé par l'Association «Esperanto 22» avec comme thème principal «Opposons-nous à la crise».
• 230 participants s'y sont rencontrés, entre congressistes et organisateurs très prévenants
• Gaby Tréanton, petite femme mais espérantophone d'une grande efficacité, atteignant presque 90 ans a été nommée Présidente d'Honneur
• Les habitants de Hillion ont été invités gratuitement aux conférences et aux spectacles
• Film et débat sur «la bataille de l'eau»
• Conférence-débat de Cyrille Hurstel et Bernard Lagrange(1) : «Sortie de crises»
• Présentation du fameux écrivain «Louis Guilloux» qui a passé son enfance près de la cathédrale Saint-Stéphane à Saint-Brieuc.
• Danses accompagnées par la musique traditionnelle bretonne
• Le « Canto Général » du chœur associatif Interkant'
• Chants au piano de Guillaume Armide
• Amusante pièce de théâtre du groupe Esperanto-Vannes : «La salle d'attente» (chez un médecin). Pour voir la pièce :
http://v.youku.com/v_show/id_XMTk3MDkzNTA0.html
Ce lien vous connectera en Chine pour voir la pièce... jouée en France !
• Excursions dans Lehon et Dinan
On a pu voir aussi Jean-Dominique Gautier, professionnel en vidéo, qui prépare déjà depuis plus d'un an un film documentaire sur le mouvement espérantiste. Liens ci-dessous :
http://www.esperantofilmo.com
http://www.esperanto-sat.info/article1659.html

**CONGRÈS FRANCO-ALLEMAND à KAISERSLAUTERN (Allemagne)**
**21 - 24 mai 2010**

Kaiserslaütern se situe dans la région sud-ouest allemande nommée «Palatinat», à environ 90 kilomètres de la ville française Forbach (Moselle). Pont entre l'Allemagne et la France, la ville a entretenu, pendant des siècles, d'intenses relations avec l'Etat français voisin. 239 participants se sont rencontrés avec le soutien de la ville.
Diverses conférences, entre autres :
• Valeurs européennes et symboles
• Conférence du mouvement «Europe Démocratie Espéranto» (EDE) qui est né en France en 2003. Il existe maintenant dans 4 pays d'Europe : France, Allemagne, Hongrie et Pologne
Thème de la conférence : «Conscience politique en espéranto»
Diverses excursions :
• Dans la ville elle-même on pouvait visiter, à pied, le très beau jardin japonais ou, dans le sud de la ville, la tour Humberg qui se dresse sur le mont Humberg (425 m de haut) etc.
Diverses organisations :
• Concert de Guillaume Armide(2) (chants au piano)
• Chœur Interkant'
• Bal folklorique(3) avec le groupe musical Kapriol' de Groningen (Pays-Bas)
• Jeu «Homlupo» (Loup-garou) dirigé par Sébastien Montagne (d'Angers).

(1) (2) (3) Ces conférences et organisations ont été filmées. Il est possible de voir par Internet (et même de télécharger) ces vidéos jusqu'à fin 2010, en écrivant un courriel à : mogovoeo@yahoo.com et en disant dans votre message : Ce que vous voulez voir, dans quelle gazette et quel numéro vous avez vu cette information (par ex. : Anĝeva folio N°17). Vous recevrez tout de suite après, procédure et mot de passe pour vous connecter.

## *Kongresoj riĉaj pri partigoj kaj emocioj :*

### 65-a SAT-AMIKARA KONGRESO EN HILIONO (apud San-Briego)

**3a - 6a de aprilo 2010**

organizita de Asocio «Esperanto 22» kaj dediĉita al ĉeftemo «Ni krizkontraŭu».

• 230 partoprenintoj renkontiĝis kune kun la tre afablaj akceptantoj

• Gaby Treanton, virineto sed efikega Esperantistino, preskaŭ 90-jaraĝa estis nomata Honorprezidantino

• La loĝantoj de Hiliono estis invititaj, senpage, al la konferencoj kaj spektakloj

Abundaj prelegoj kaj debatoj okazis kun lokaj asocioj :

• Filmo kaj parolado pri «La batalo de akvo»

• Prelego-Debato de Cyrille Hurstel kaj Bernard Lagrange(1) : «Eliro el krizoj»

Diversaj aranĝoj :

• Prezentado de la fama verkisto «Louis Guilloux» kiu travivis sian infanecon apud la katedralo Sankta Stefano en San-Briego

• Dancoj per tradicia bretonia muziko



*Antaŭ la kongresejo «Espace Georges Palante» en Hiliono*

• Ĝenerala Kanto de la Asocio Interkant'

• Kantoj piane de Gijom Armide

• Amuza teatraĵo de la grupo Esperanto-Vannes. La titolo estas «La atendejo» (atendado ĉe kuracisto). Por vidi la teatron :
http://v.youku.com/v_show/id_XMTk3MDkzNTA0.html
Tiu ligilo sendos vin en Ĉinio vidi la teatraĵon... ludita en Francio !

• Ekskursoj en Lehon kaj Dinan

Surloke, oni vidis Jean-Dominique Gautier kiu nun estas preparanta, jam de pli ol unu jaro, dokumentan kaj profesian filmon pri la esperanta movado. Ligiloj ĉi sube :

http://www.esperantofilmo.com/
http://www.esperanto-sat.info/article1659.html

### FRANC-GERMANA KONGRESO EN KAISERSLAUTERN (Germanio)

**21a - 24a de majo 2010**

Kaiserslautern situas en sudokcidenta germana regiono nomata «Palatinato», proksimume 90 kilometrojn de la franca urbo Forbach (Moselle). Ponto inter Germanujo kaj Francujo; la urbo daŭrigis dum jarcentoj intensajn rilatojn kun la najbara franca regno.
• 239 partoprenintoj renkontiĝis dank'al subteno de la urbo por tia


*Kune dankas alokajn organizantojn kaj fermas la sukcesan kongreson Xavier Dewidehem, prezidanto de UFE, kaj d-ro Rudolf Fischer, prezidanto de GEA.(C.N.)*

ideo. Kaj, dum la renkonto, kio okazis ?
Diversaj prelegoj, inter aliaj :
• Eŭropaj valoroj kaj simboloj
• Prelego de la movado Eŭropo Demokratio Esperanto (EDE) kiu naskiĝis en 2003 en Francio
Nun, ĝi ekzistas en 4 eŭropaj landoj : Francio, Germanio, Hungario kaj Pollando
Temo de la prelego : «Esperantista politika konscio».
Diversaj ekskursoj :
• En la urbo mem oni povis viziti, piede, la belegan japanan ĝardenon aŭ, en la suda parto de la urbo, staras la Humberg-Turo sur la monto Humberg (425 m alta) ktp...
Diversaj aranĝoj :
• Koncerto de Gijom Armide(2) (kantoj + piano)
• Ĥoro Interkant'
• Folklora balo(3) kun la muzikgrupo Kapriol' el Groningen (Nederlando)
• Ludo «Homlupo» gvidita de Sébastien Montagne (el Angers)
kaj multaj eblecoj, renkontiĝoj inter francaj kaj germanaj kongresanoj en amika etoso.

(1) (2) (3) Tiuj prelegoj kaj aranĝoj estis filmitaj. Eblas vidi rete (kaj eĉ elŝuti) tiujn videojn ĝis fine de 2010, skribante retmesaĝon al :
mogovoeo@yahoo.com
kaj dirante en via mesaĝo : kion vi volas vidi, en kiu gazeto kaj numero vi vidis tiun informon (ekzemple : Anĝeva folio N°17). Vi ricevos tuj poste proceduron kaj pasvorton por konekti vin.

## Nouvelles du monde

Le Congrès universel d'espéranto 2010 s'est tenu à La Havane du 17 au 24 juillet, en présence de 1 000 participants de 59 pays.
A l'issue des travaux du congrès, la résolution finale note que les Nations Unies ont déclaré 2010, année du rapprochement des cultures et invite les Nations Unies et l'UNESCO à utiliser leurs relations avec l'Association internationale d'espéranto pour contribuer à la réalisation de leurs objectifs. M. Probal Dasgupta, linguiste indien, a été confirmé dans ses fonctions de président de l'Association universelle d'espéranto UEA. Le nouvel ambassadeur d'Allemagne en Russie, M. Ulrich Brandenburg, excellent espérantophone, a été nommé membre du comité d'honneur de l'Association.

Poursuivant la tradition établie par son prédécesseur, le Pape Benoît XVI ajoute toujours l'espéranto à la soixantaine de langues qu'il utilise pour adresser publiquement ses voeux de Pâques et de Noël.

Le Centre Espéranto d'Angers propose aux établissements d'enseignement, milieux universitaires, Maisons de quartier, bibliothèques etc., le prêt de deux vastes expositions :
- Une exposition internationale de 300 dessins d'enfants de 13 pays sur 50 panneaux.
- L'exposition montrée en 2009 à la Bibliothèque municipale d'Angers, à l'occasion du 150e anniversaire de Zamenhof, initiateur de la langue internationale espéranto. Ce sont des panneaux illustrés sur l'histoire de la langue.

http://fotoj.esperanto-angers.fr

Sur Internet, pour son projet WikiTrans, la firme GramTrans a entrepris la traduction automatique en espéranto de tous les articles de la version anglaise de Wikipedia. Il existe déjà un Vikipedio en espéranto qui propose plus de 130 000 articles. http://epo.wikitrans.net

Des étudiants choisissent l'espéranto et l'interlinguistique comme thème de leur thèse en mémoire à l'université.
Ces travaux ont été regroupés sur papier et sur Internet pour téléchargement.

Des membres du Centre espéranto d'Angers ont participé à une remarquable manifestation artistique, le 13 juin au Mans.
45 chanteurs et musiciens ont présenté en espéranto des extraits du «Canto general», œuvre célèbre du poète chilien Pablo Neruda sur une musique de Theodorákis.



Assimil, qui avait déjà publié un «Espéranto sans peine», propose maintenant dans la collection «Langues de poche», un «Espéranto de poche» à l'intention des voyageurs, que nous pouvons recommander.

Bouygues-Immobilier projette de construire à Angers un immeuble avec 131 logements d'étudiants. Cet immeuble aura pour nom Esperanto. La feuille d'information contient un paragraphe consacré à la langue internationale.

## Novaĵoj el la mondo

La Universala Kongreso de Esperanto 2010 okazis en Havano kun 1 000 partoprenantoj el 59 landoj (17-24a de julio).
Fine de la kongreso, la adoptita rezolucio notas, ke la Unuiĝintaj Nacioj proklamis 2010, jaro de la interproksimigo de la kulturoj kaj do invitas Unuiĝintajn Naciojn kaj UNESKO uzi siajn rilatojn kun UEA por kontribui al la realigo de siaj celoj.
S-ro Probal Dasgupta, hinda lingvisto, estis reelektita prezidanto de Universala Esperanto Asocio.
La nova germana ambasadoro en Rusio, S-ro Ulrich Brandenburg, bonega Esperantisto, estis nomumita membro de la honora komitato de la internacia asocio.

Daŭrigante la tradicion starigitan de lia antaŭulo, la Papo Benedikto la 16-a aldonas ĉiufoje Esperanton al la sesdeko da lingvoj, kiujn li uzas por publike esprimi siajn bondezirojn okaze de Pasko kaj Kristnasko.

La Esperanto-Centro de Angers proponas al instruaj institucioj, universitataj medioj, kvartalodomoj, ktp, la pruntdonon de du vastaj ekspozicioj :
- Internacia ekspozicio de infanaj desegnoj el 13 landoj, per 50 paneloj.
- Ekspozicio montrita en 2009 en la urba biblioteko, okaze de la 150-a datreveno de Zamenhof, iniciatinto de la internacia lingvo Esperanto. Temas pri ilustritaj paneloj pri la historio de la lingvo.

http://fotoj.esperanto-angers.fr

En Internet, por sia projekto WikiTrans, la firmao GramTrans, entreprenis la aŭtomatan tradukon en Esperanton de ĉiuj artikoloj de la angla versio de Wikipedia (jam funkcias Vikipedio en Esperanto proponante pli ol 130 000 artikolojn). http://epo.wikitrans.net

Studentoj elektas Esperanton kaj interlingvistikon kiel temo de siaj tezoj aŭ disertacioj en universitato.
Tiuj laboraĵoj estis grupitaj surpapere kaj ankaŭ interrete por elŝutado.

Membroj de la Esperanto-Centro de Angers partoprenis rimarkindan artan manifestacion la 13-an de junio en Le Mans. 45 kantistoj kaj muzikistoj prezentis en Esperanto ekstraktojn de «Canto General», fama verko de la ĉilia poeto Pablo Neruda, kun muziko de la greka komponisto Teodorakis.

La firmao Assimil, kiu jam publikigis «Espéranto sans peine», ofertas nun en la kolekto «Langues de poche», libreton «Espéranto de poche» por la vojaĝontoj, kiun ni povas konsili.

Bouygues-Immobilier projektas konstrui en Angers domegon kun 131 loĝejoj por studentoj. La konstruaĵo estos nomita Esperanto. La informa folio entenas paragrafon pri la internacia lingvo.

## *Venantaj eventoj*

### KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ

**27 déc. 2010 - 02 jan. 2011** - en Burg (Spreewald), Germanio : Junulara Esperanto-Semajno

**22-26 aprilo 2011** - en Sète, Francio : Inter-asocia Esperanto-kongreso

**14-21 julio 2011** - Hlibivka, Ukrainio : 67-a Internacia Junulara Kongreso (IJK)

**23-30 julio 2011** - en Kopenhago, Danio : 96-a Universala kongreso de Esperanto

**2012** - en Hanojo, Vjetnamio : 97-a Universala kongreso de Esperanto

*Planitaj estas multaj aliaj Esperanto-renkontiĝoj, troveblaj ekzemple en la retejo de Eventoj : www.eventoj.hu*

### CONGRÈS ET RENCONTRES

**27 déc. 2010 - 02 jan. 2011** - à Burg (Spreewald), en Allemagne : Rencontres de jeunes espérantophones. Burg se trouve près de la frontière polonaise.

**22-26 avril 2011** - à Sète, France : Congrès d'espéranto inter-associatif.

**14-21 juillet 2011** - à Hlibivka, Ukraine : 67ème Congrès International des jeunes espérantophones. Le congrès aura lieu à Hlibivka (30 km au nord de Kiev). Des centaines de jeunes de dizaines de pays et qui converseront... sans interprète !

**23-30 juillet 2011** - à Copenhague, Danemark : 96ème Congrès Mondial d'Espéranto. En général 2000-3000 participants d'une soixantaine de pays.

**2012** - à Hanoï, Viêt-nam : 97ème Congrès Mondial d'Espéranto.

*On peut trouver de nombreux autres congrès et rencontres sur le site de la revue Eventoj : www.eventoj.hu*

## *Kantoj el Gijom Armide*

■ *Une chanson engagée (à écouter sur son site - lien ci-dessous) :*
***« Kanzono, kiun neniu aŭskultas - Chanson que personne n'écoute »***
*http://www.ipernity.com/doc/lilioakvo/2923094*

■ *Une autre chanson présentée aussi ci-dessous :*
***« Viaj bukloj - Tes boucles »***
*http://www.ipernity.com/doc/lilioakvo/5830848*

### *Viaj bukloj*

*Iris viaj bukloj*
*For de via hararo*
*For de via vizaĝ'*
*Nu for de nia mond'*

*Mankas viaj bukloj*
*Al la tuta homaro*
*Al l'akvo al la braĝ'*
*Al l'universa rond'*

*Kiu faris tion al vi*
*Ĉu pro mis' ĉu pro envi'*
*Ĉu per tondo ĉu per brul'*
*Tiu estas krimul'*

*Estis viaj bukloj*
*antenoj de via kor'*
*Ond' de via anim'*
*Kaptil' de via pens'*

*Iĝis viaj bukloj*
*Dolor' de ĉies memor'*
*Neĉeestanta rim'*
*Fantom' por ĉies mens'*

*Kiu faris tion al vi*
*Ĉu pro mis' ĉu pro envi'*
*Ĉu per tondo ĉu per brul'*
*Tiu estas krimul'*

*Kiam revenos al*
*Nia infera spiral'*
*Ĉu per diaj ruloj*
*Belaj viaj bukloj?*

### *Tes boucles*

*Elles s'en sont allées tes boucles*
*Loin de tes cheveux*
*Loin de ton visage*
*Enfin, loin de notre monde*

*Elles manquent tes boucles*
*À l'humanité entière*
*À l'eau, à la braise*
*À la ronde universelle*

*Celui/celle qui t'a fait ça*
*Fût-ce par erreur ou par envie*
*Fût-ce par la lame ou par les flammes*
*Celui/celle-là est un-e criminel-le*

*Elles étaient tes boucles*
*Les antennes de ton coeur*
*Les ondes de ton âme*
*Le piège de ta pensée*

*Elles sont devenues tes boucles*
*Une douleur pour toutes les mémoires*
*Une rime absente*
*Un fantôme pour tous les esprits*

*Celui/celle qui t'a fait ça*
*Fût-ce par erreur ou par envie*
*Fût-ce par la lame ou par les flammes*
*Celui/celle-là est un-e criminel-le*

*Quand reviendront*
*À notre spirale infernale*
*Fût-ce par des bigoudis divins*
*Tes si belles boucles ?*

## *Vous informer*

**www.esperanto-angers.fr**

www.esperanto-france.org
www.esperanto-jeunes.org
www.uea.org
www.esperanto.net

## *Nous contacter*

**Centre Culturel Angevin d'Espéranto**
41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers - Tél. 02 41 73 17 97
Courriel : info@esperanto-angers.fr

## Memorindaj datoj

### MERKREDON LA 15-AN DE SEPTEMBRO

**PRELEGO «ĈIUTAGA JAPANIO»**
**20h30 - en kunvenejo Les Jonchères**
**(34, av. Jean XXIII en Anĝevo)**
Mireille Grosjean prelegos (Esperante) pri Japanio helpe de 600 bildoj, post restado de oktobro 2008 ĝis marto 2009.

### ĴAŬDON LA 16-AN DE SEPTEMBRO

**PRELEGO «PACEDUKADO-SPERTOJ PRI INSTRUADO DE KONFLIKTOSOLVADO»**
**20h30 - en kunvenejo Desjardins (eksa soldat-loĝejo Desjardins, en Anĝevo, kvartalo la Brisepotière)**
Enkadre de la aranĝoj okaze de la Internacia Paco-Tago, la Esperanto-grupo de Angers proponas debat-prelegon (franclingve) de Mireille Grosjean kiu estas interalie kunprezidantino de la Asocio de svisaj edukistoj pri la paco. Pli da informoj pri ŝi en Vikipedio aŭ en ŝia reta taglibro : http://mirejo.blogspot.com

### MARDON LA 21-AN DE SEPTEMBRO

**PACOTAGO**
**17h30 - Placo de la Paco en Anĝevo**
Diversaj manifestacioj okazos, kadre de la Internacia Pacotago. Ĉeesto de nia Anĝeva Esperanta grupo kun ĝia budo, pikniko/debato, koncerto de la ĥoro La Viva.



## Les dates à retenir

### MERCREDI 15 SEPTEMBRE à 20h30

**CONFÉRENCE «LE JAPON DE TOUS LES JOURS»**
**à la salle des Jonchères**
**(34, avenue Jean XXIII à Angers)**
Mireille Grosjean présentera (en espéranto) le Japon avec 600 photos suite à un séjour d'octobre 2008 à mars 2009.

### JEUDI 16 SEPTEMBRE à 20h30

**CONFÉRENCE «ÉDUCATION À LA PAIX, EXPÉRIENCE SUR L'ENSEIGNEMENT À LA RÉSOLUTION DES CONFLITS»**
**à la salle Desjardins (ancienne caserne Desjardins, quartier de la Brisepotière à Angers)**
Dans le cadre des manifestations à l'occasion de la Journée Internationale de la Paix, le Centre Culturel Angevin d'Espéranto propose une conférence-débat (en français) de Mireille Grosjean, co-présidente de l'Association suisse des Éducateurs à la Paix. Plus d'informations sur Mireille Grosjean sur Wikipedia ou sur son blog : http://mirejo.blogspot.com

### MARDI 21 SEPTEMBRE à 17h30

**JOURNÉE DE LA PAIX**
**Place de la Paix, quartier Doutre à Angers**
Dans le cadre des manifestations à l'occasion de la Journée Internationale de la Paix, le Centre Culturel Angevin d'Espéranto sera présent avec son stand. Au programme : discours en espéranto, pique-nique/débat, concert de la chorale La Viva.

**dernière minute**

Le Centre socio-culturel de Changé (10 km au sud-ouest du Mans) a publié son programme pour la période septembre 2010 / janvier 2011. Un concert du **chanteur espérantophone Jomo** est inclus dans cette programmation. Il aura lieu le **vendredi 12 novembre à 20h** (spectacle de danse contemporaine en première partie). Pour en savoir plus, consultez la page 13 de la brochure (lien ci-dessous).
http://lerabelais.change.free.fr/joomla/index.php?option=com_content&view=article&id=178:jomo&catid=10:festival&Itemid=22